

Esperanto tra la Mondo



Subskribo-kolektado. — La kolektado de subskriboj por la peticio al UN daŭros ĝis la 31-a de Julio. Ĝis la 3-a de Decembro estis jam ricevita pli ol 500.000 individuaj subskriboj kaj la aprobo de 2.771 organizaĵoj diverspecaj, kies membraro atingas preskaŭ 48 milionojn.

Renkontiĝoj en 1966. — Samtempe kun la Kongreso en Budapeŝto, okazos apud tiu urbo antaŭkampado de la Mondkongreso de Internacia Federacio de Kampado. Esperanto-tendaro povus esti instalita. Skribu al : S-ro Lavallée, 63, av. Carnot, Bordeaux-Caudéran, Francio.

— Kongreso de la katolikaj esperantistoj okazos en Sankt Gallen (Svisio), 21 - 27-an de Julio.

— Eŭropa Ferio-semajno en Goldern (Svisio), apud la lago de Zŭrich (4-11 septembro). Adreso : S-ro H. Hunkeler, Pf. 417, CH-5001, Aarau.

— Jubilea 50-a Brita Kongreso de Esperanto, en Norwich, 27-30 de majo. Adreso : S-ino E ; Watson, 5 Rolleston Close, Norwich, Norfolk, Britujo.

— Aŭstria Esperanto-Federacio kaj « Heroldo » aranĝos ferian restadon en la urbeto Klosterneuburg, apud Vieno, 26-30 de julio.

— Internacia Pedagoga Esperanto-Seminaro, 10-12-8 en Hungario. Adreso : Pedagoga Grupo de H.E.A., Aprilis 4 ut. 1, Szeged.

— Nacia Esperanto Kongreso, en Agen (Francio) dum Pentekosto (28-30 de majo).

— Ĉe Bonat (Creuse) Francio, okazos de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto intensa Esp.-Kurso. Poste, konstrulaboro, amuziĝo, kunrestado, ĝis la 2-a de Septembro. Junaj esperantistoj helpu ! Rilatu kun : J.-P. Boulet, Grande-Rue, 18 - Chateameillant, Francio.

— Dua Internacia Esperanto-Seminaro por sciencistaj studentoj, en Torun (Pollando) 14-16 de Aprilo. Adresoj : F. Simonnet, 16, rue Dohis, 94 - Vincennes, aŭ : Studenta Scienca Rondo, str. Moniuszki 16/20, Torun, Pollando.

52-a Universala Kongreso. — La estraro de U.E.A. voĉdonis favore al okazigo de tiu kongre-

so en Tel Aviv (Israelo) en 1967. U.E.A. aranĝos aviadilan karavanon.

Novajoj el Ĉinio. — La revuo « El Popola Ĉinio » anoncas, ke la Centra Farejo de Novaĵaj kaj Dokumentaj Filmoj ĵus produktis, en kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo, kolorfilmon en Esperanto kun la titolo « Brila Festotago ». La prezentado daŭras ĉirkaŭ unu horon.

...el Brazilo. — Okazis en oktobro la 19-a brazila Esp.-Kongreso. Partoprenis eminentuloj, i.a. la prezidanto de la brazila Akademio de Filologio kaj la rektoroj de la Universitatoj de Brazilo kaj de Guanabara.

...el Ĉeĥoslovakio. — En Slovakio revigligas la movado. Fondiĝis multaj novaj rondetoj. Aperis nova lernolibro. La Bratislava Televido raportis pri renkontoj kaj programoj. La klubo de Brno havas proksimume 400 membrojn.

Eldonaĵoj. — En la fama serio « Oriento-Ocidento », U.E.A. ĵus eldonis « Reĝo Lear », de Shakespeare, en traduko de Kalocsay.

— Ĵus aperis « Katalogo de elektitaj libroj en Esperanto », eldonita de U.E.A.

— Pensu pri « Planteto », trimonata gazeto por infanoj. Adreso : Niko Tumi, Pispalanharju 13, Pispala, Finnlando. Petu provekzempleron.

— Vi povas pruntericevi 72 diapozitivajn kaj sonbendon kun teksto kaj dalmatia muziko. Sendu 2 respondkuponon al : S-ro Hugo Kraus, Brigittenauer Lande 150/5/3/12, Wien, XX/20 Aŭstrio.

Turistoj. — Se vi vizitos Francion, ni rekomendas al vi :

— « Gvidlibro tra Parizo », de Esperantaj Francaj Eldonoj.

— Gvidlibretojn : « De Parizo al Lazura Marbordo », « De Parizo al Pirenea montaro », « De Parizo al Loire-kasteloj kaj Atlantikaj strandoj » de S-ro Retot. Haveblaj ĉe nia Libro-Servo.

— Petu de Syndicat d'Initiative, 03 - Vichy, Francio, la belan, multkoloran, esperantlingvan informilon pri tiu turisma kuraĉloko.